

& Kiel rekoni la amon:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 203 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Klara Ilutoviĉ (Literatura konkurso Liro, Kaliningrad 2003). Baladigis Martin Strid (2017) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por Davida balado.>

(#Melodio:

<1,6:29> (

/mi mire reedodo dodo; doododo dore mimi; mi mire mimire mimi; soososo faamimi mimi;

(#Rekantaĵe: redo re rere mire do rere re; rere mire doTi LaSo So LaTi do o)

)×7)+

(&Strofoj:

,& Kiel rekoni la amon:

'1 / Griza malvarma nebulo. ; Mondo minaca aŭ splena, ; kiel senhoma insulo. ; Tamen mi estas ĝojplena.

(×: **Bruas danco en halo, dancu en ĉen'!** ; **Ĝojaj paŝas ni en esperanto-kunven'**.)

'2 Nigra envio disrampas ; Boras rigardo rankora. ; Veron malver' preme dampas. ; Tamen mi estas bonkora.

'3 Ĉu povas nun sin defendi ; homo plorige malriĉa? ; Kion do morgaŭ atendi?.. ; Tamen mi estas feliĉa.

'4 Se l' bono ĉie brakumas, ; kiel magia balzamo, ; se en mallum' ĉio lumas – venis la amo.

,& Ĉu la sun' rapidas:

'5 Ĉu la sun' rapidas ; estingiĝi nun? ; Se infanoj ridas – ; Lumos plu la sun'.

'6 Ĉu la tero hantas ; nigra sen esper'? ; Se infanoj kantas – ; Verdos plu la ter'.

'7 Ĉu la viv' pereas ; laŭ la efektiv'? ; Se infanoj kreas – ; daŭros plu la viv'.)